Novjara mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres

La mondo bonvenigas la jaron 2022 en tempo kiam niaj esperoj pri la estonteco troviĝas sub premo

Pro kresko de malriĉeco kaj intensiĝo de malegaleco.

Pro neegala distribuado de KOVIM-vakcinoj.

Pro klimataj interkonsentoj kiuj ne sufiĉas.

Kaj pro daŭraj konfliktado, disdivido kaj misinformado.

Chiuj ĉi ne estas nur politikaj defioj.

Ili estas moralaj kaj realaj defioj.

Kaj ili estas defioj, kiujn la homaro kapablas superi - se ni decidos fari el la jaro 2022 jaron de resaniĝo por ĉiuj.

Resaniĝo el la pandemio - per kuraĝa plano por vakcini ĉiun homon, ĉie.

Resaniĝo por niaj ekonomioj — per subteno fare de pli riĉaj landoj al evolulandoj per financado, investo kaj ŝuldoredukto.

Resaniĝo el malfido kaj disdivido - kun nova emfazo je scienco, faktoj kaj racio.

Resaniĝo el konfliktado — kun renovigita spirito de dialogo, kompromiso kaj reproksimiĝo.

Kaj resaniĝo por nia planedo - kun klimataj sindevigoj, kiuj kongruas kun la urĝeco de la krizo.

Momentoj de granda malfacilo estas ankaŭ momentoj de grandaj perspektivoj.

Por kuniĝi solidare.

Por unuiĝi ĉirkaŭ solvoj, kiuj povas helpi ĉiujn homojn.

Kaj por antaŭeniri - kune – plenaj je espero pri tio kion kapablas nia homara familio.

Kune, ni decidu pri resaniĝo kiel celo por 2022.

Por homoj, la planedo kaj prospero.

Mi deziras al vi ĉiuj feliĉan kaj pacan novjaron.

Originala teksto: https://www.youtube.com/watch?v=w7OhpDcxFBY&t=103s